

Johann Wolfgang von Goethe,

Same

tradukita de Pejno Simono

Super montopintoj —
 silent',
 tra pinoplingloj
 la senvent'
 spiras sen fort';
 arbare la birdoj ekmutas.
 Pretu, aludas
 silento pri mort'.

...

Johann Wolfgang von Goethe,
 the,

Super montoj regas
 kviet'

tradukita de Poul Thorsen

Super montoj
 regas kviet',
 tra l' foliaro
 nur ventet'
 spiras kun trem'.
 Birdoj arbare silentas,
 se vi atendas,
 pacas vi mem.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Same tiel

tradukita de Richard Schulz

Super ĉiuj montoj
 Trankvil',
 Kaj ĉiuj fontoj
 Sen babil';
 Aŭdas vi ne
 Birdetan ĉirpon arbare.
 Pensu prepare
 Pri la pere'!

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Ein Gleiches (Wanderers
 Nachtlied)

Über allen Gipfeln
 Ist Ruh,
 In allen Wipfeln
 Spürest du
 Kaum einen Hauch;
 Die Vögelein schweigen im Walde.
 Warte nur, balde
 Ruhest du auch.

...

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (*Simon Edward Adrian Payne*, *1941-12-23).

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (*1915-01-07 – †2006-01-30).

Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (*Rikardo Ŝulco*, *1906-07-12 – †1997-09-26).

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la “*Vestfaliaj Flugfolioj*”, kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (*Richard Schulz*), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).

Arg-356-705 (2013-12-12 22:17:04)

Verfasst am 6./7. September 1780 auf dem Kickelhahn (*Gickelhahn*) bei Ilmenau (*Thüringen*), wo Goethe die Verse mit Bleistift an die Bretterwand einer Jagdhütte schrieb. (Anm. d. Hrg.) Goethe verkis tiun ĉi poemon je la 6./7. de Septembro 1780 sur la monto Kickelhahn ĉe Ilmenau en Turingio (*Germanio*). Tie li skribis la versojn per kraĵono sur la tabulo-vandon de ĉasista kabano. (*rimarkigo de l' eldoninto*)